

Volume 7

June, 1910


Number 5

UNIVERSITY OF CALIFORNIA

Amerika Esperantisto

A Monthly Magazine of the
International Language

ESPERANTO



American Esperantist Company
700-714 East Fortieth Street
CHICAGO

Price, Ten Cents

Per Year, One Dollar

Inter Blinduloj (Javal—Javal).....	.60
Internacia Kreatomatio (Kabe).....	.40
Julio Cezaro (Lambert)60
Kastelo de Prolongo (Dro. Vallienne)...	1.20
LA KOLOMBA PREMIQ (Dumas-Papot) ..	.20
Kolorigisto Aerveturanto15
Komercaj Leteroj (Berthelot kaj Lambert)	.20
Komerca Sekretario (Sudria)20
Komunista Manifesto (Marx—Baker)59
Konkordanco de Ekzercaro (Wackrill)35
Kondukanto kaj Antologio (Grabowski)..	.60
Graded exercises, literaturé, etc.	
Kristana Esperanta Kantareto20
Kurso Tutmonda Lau Natura Metodo...	.25
Kvar Evangelioj50
Libro de Humorajo75
Lauroj (prize articles from "La Revuo")..	.65
Matematika Terminaro (Bricard).....	.25
Mistero de Dolore (Pujula y Valles).....	.60
A three-act Drama.	
Monadologio (Liebniz—Boirac)20
OPSO DE LIA ONKLO (R. M. Chase)20
Muzika Terminaro (F. de Menil).....	.20
Nevo Kiel Onklo (Schiller—Stewart)....	.30
Ordo de Diservo (Anglican Church).....	.20
Patroj kaj Filoj (Turgenjev—Kabe).....	.75
Plena Vortaro Esperanto-Esperanta (Boirac)	1.20
Poia Antologio (Kabe).....	.60
Polish Text-Book30
Polish Word-Book25
Pri Apendicito (Roberts-Besemer)10
Provo de Mariata Terminaro20
Paghoj el Frandra Literaturo.....	.45
Predikanto25
Primer of Esperanto (O'Connor).....	.10
Prozo kaj Versoj (Vincente Inglada).....	.60
Psalmaro75
Pictorial Esperanto Course.....	.35
Poshkalendaro (Fred)25
Rabistoj (Schiller—Zamenhof)65
Rakontoj pri Feinoj (Perrault—Sarpy)...	.30
La Regho de la Montoj.....	1.05
Revizoro (Gogol—Zamenhof)50
Robinsono Kruso (Defoe—Krafft)50
Rompantoj (Valjes)30
Sentencoj de salomono (Zamenhof).....	.45
Shi Klinighas Por Venki50
Standard Course (Bullen) paper25
Standard Course; same, in cloth50
Standard Manual (Jelley), cloth, 50; paper	.35
Sug la Negho (Porchat—Borel) paper35
Tria Kongreso50
Tri Unuaktaj Komedioj30
Universala Vortaro (Zamenhof)30
Unua Legolibro (Kabe)55
Unua Protestant Diservo15
Ventego (Shakespeare—Motteau)75
Verdaj Fajreroj (Frenkel)30
Verkaro de Devjatnin60
Virineto de la Maro (Zamenhof)45
Vojagho Interne de Mia Hambro25
Vollstandiges Lehrbuch der Esperanto ..	.45
Worterbuch Deutsch-Esperanto75
Yiddish Text-Book (Bresler)25

ESPERANTO KEYS.

Foreign Languages, per copy, 2c; 100....	1.25
Bohemian, French, German, Hungarian, Italian, Norwegian, Portuguese, Russian, Spanish.	
Keys in English, 2c each; in lots of 25 or more, each01
No better propaganda matter is printed Write a letter to your friends, in Es- peranto, enclosing a Key. He will be "tickled" to see how easily he can read	
WHOLE OF ESPERANTO	
Foreign Languages, per copy, postpaid..	.05
Bohemian, French, German, Italian.	
PROPAGANDA PAPER	
Elements of Esperanto, 16-page pamphlet; 10 for 10c; 50 for 30c; 100.....	.50
Grammar Propaganda Cards, 50 for 13c; 10025

SONG-BOOKS AND MUSIC.

Sheet music is imported by us often through indirect sources and cannot be guaranteed in perfect condition. Sent postpaid in strong mailing tubes at prices quoted:	
Himno al Zamenhof (Deshays)35
La Kanto de l'Cigno (F. de Menil)35
La Vojo (Deshays)20
Kushas Somero (F. de Menil)35
Mi Andas Vin (L. Zamenhof-Harris)35
Birdoj Forflugu (Seyanaeve—Guivy)50
Himno (Dombroviski—Guivy)40
Serenado (Butler—Bird)35
Esperanta Kristana Kantareto20

INTRODUCTION TO ESPERANTO.

Declared by many persons to be the very best piece of propaganda matter to put in the hands of the man who isn't an expert on grammar. Handsome half-tone cover on enamelled stock. Made to sell at ten cents, but reduced to five cents a copy for propaganda purposes.

FOREIGN MAGAZINES.

During 1909 we bought many foreign magazines of Esperanto in bundles, and have hundreds of odd copies left over. We will send you ten, all different titles, for fifty cents, but can't make special selections. Most people who've bought these bundles were highly pleased.

PROPAGANDA PHOTOGRAPH.

We have some large imported photographs of a great collection of Esperanto periodicals. These were offered by mistake at 10 cents. They cost more than that in Germany, and the price, mailed in secure package, is 25 cents. It is quite the thing to show for propaganda purposes, and no collection is complete without it.



AN APOLOGY.

Readers of *Amerika Esperantisto* are requested to accept apologies for the rather worse than usual appearance of our June number, and its lateness. Promising you a special write-up on Washington for this number, Mr. Baker went there May 14, receiving a letter announcing the serious illness of the Chicago manager and requesting his early return. He came back to Chicago, was compelled to spend the following week lecturing in Pennsylvania, Ohio and Michigan, and depended on Washington sources for the "copy" or an important part of it, for the June number. After waiting in vain until the last possible moment, we are compelled to make wholesale revisions in plans for the June, and ask our readers to behold us prostrate at their feet.

ATTENTION NEW ENGLAND!

No one who was present at the delightful meeting of the New England Association, which was held in Manchester last summer, will need to be told that in accepting the invitation of the Portland Society to meet with them on Saturday, June 18, we are assured in advance of a royal good time. A goodly delegation from the Boston Society has signified its intention of attending and will leave Boston on Friday evening via the Portland steamer. All Esperantists who may find Boston a convenient starting point are cordially invited to join this pilgrimage. It is expected that the meetings will be so planned that those who *must* leave on Saturday night may do so without losing any of the important features of the gathering.

It is earnestly hoped that *every* society in the Association will be well represented, and all who can possibly attend are earnestly requested to communicate as early as possible either with the Secretary of the division or with Mr. Herbert Harris, 730 Congress street, Portland. Upon so doing further particulars as to accommodations, etc., will be furnished.

This gathering will be an appetizer for the Washington Congress, and by the way, there is a steadily growing enthusiasm among New Englanders over our first international gathering. Boston will send a good delegation, and the prospects are that New England will be strongly represented. Plans for transportation and accommodation are already well under way and the indications are that the trip may be taken at a surprisingly moderate expense. Our

Committee in Washington has been very quiet, but has been industriously sawing wood, and at the present writing matters are well in hand and the success of the congress is already assured.

It is desirable to know at an early date how many are intending to go from our Association, in order that adequate accommodations may be provided and that if we make the trip partly by water, as is now planned, state-room accommodations may be reserved.

If you miss this congress it will be a matter of life-long regret. Make up your minds early and send early for full particulars as to transportation, accommodation and expense.

HAVE YOU BOUGHT YOUR CONGRESS TICKET? I have, and it was number thirteen, but even with such a handicap I expect to have the time of my life!

Come on down to Washington with us and have something to tell your grandchildren about.

DON'T forget to send as early a response as possible, for a lot depends upon advance knowledge of the size of our party.—*C. H. Fessenden*, Secretary, N. E. A. A., 34 Pelham St., Newton Centre, Mass.

CONGRESS NOTES.

STATE DEPARTMENT ACTION.

The Congress Committee are glad to be able to report great success with the United States State Department. Through the ambassadors and ministers invitations are now being delivered, asking that the various governments of the world participate in the Sixth Esperanto Congress by sending delegates. We have thus secured the same government recognition that was secured last year for the Fifth Congress.

CLASS OF POLICEMEN.

A squad of Washington policemen are studying Esperanto under the instruction of Edwin Reed. Although they started to take up the study rather late, it is expected that their knowledge will be sufficient to give some aid to the congress members. Each man in this Esperanto Squad was a member of the International Police during the Boxer trouble in China, and has therefore had an experience when Esperanto would have been of great value.

THEATRICALS.

The play to be given during the congress week will be a most unique affair, the first of its kind in the world. The play chosen is Shakespeare's "As You Like It." It will be given in a most beautiful spot in the open air

among the trees in Chevy Chase, about half an hour by car from the centre of the city. The spot chosen seems as though made for such a presentation, having a natural raised "stage," covered with splendid trees, and the "auditorium" has a slight incline toward this. The play will be given by The Hickman Players, and the translation will be by Dr. Ivy Kellerman-Reed.

THE BALL.

The International Ball, always a feature most interesting at the Esperanto Congresses, will be opened by a dignified and interesting grand march. Señor Mariano Osmeno and Señor Domiciano J. Sandoval are arranging to give during the evening a typical Filipino dance in which several Filipinos will participate. One number on the dance program will be the Virginia Reel, another the Lancers, which all are advised to practice. The balance of the program will be the dances familiar the world over, the waltz and two-step, with possibly a barn-dance.

CENTRAL DINING HALL.

The committee are now working to arrange the details for a centrally located place large enough to accommodate all the members of the congress, and there serve the meals. It is the plan to have an informal entertainment at the lunch and dinner hour each day. Every one who has any talent in vocal or instrumental music, or in recitation, is requested to communicate this fact, in spite of any natural modesty one may feel, for the committee cannot otherwise know, and much talent is necessary to fill so extensive a program. Full particulars of this dining feature will be given in the circular soon to be issued.

BASE BALL.

It is arranged that one afternoon during the week the congress members shall attend the American League Base Ball Game. An abridged and simplified set of the base ball rules is being translated into Esperanto for distribution to the congress members.

CONGRESS MEMBERSHIP.

The early sale of tickets has been extremely gratifying to the Committee, but from the fact that many write that they are coming, yet do not buy the ticket, it is clear that many do not realize what a very great help it will be in making arrangements to have the money early and thus know more definitely how many to expect. The sale abroad has been surprisingly good for so early a date. Tickets have been bought by Esperantists in Russia, Germany, France, Switzerland, Spain and England at the time this is being written. From one city in Spain four have bought tickets. Many others, representing other countries, have written saying they would be here, so all can now rest assured that it will be indeed an International Congress. Tickets for the Congress are \$5.00, and checks or money orders should be sent to Edwin C. Reed, Secretary, Chamber of Commerce, Washington, D. C.

PUBLICITY.

Between now and the Congress you will see in many papers remarks about Esperanto and the congress preparations. When you see these, do not fail to send a postal card to the editor of the paper, thanking him for giving you the information. If your local paper does not carry any matter, write and ask why. The Publicity Bureau established by the Congress Committee, and in charge of two of Washington's best newspaper men, will from now until August 14 send out matter every few days, and if your paper does not carry it, the fault is yours and your editor's.

POST-CONGRESS EXCURSION.

One of the post-congress excursions which are planned is to Norfolk and Old Point Comfort. After the adjournment of the Congress on Saturday, those who desire may take the steamer at 6:45 p. m., going down the beautiful Potomac and through Chesapeake Bay, arriving at Old Point Comfort at 7 a. m. and Norfolk at 8 a. m. During the day the time may be spent at Virginia Beach on the open ocean, visiting Fortress Monroe, Hampton Roads, Hampton Institute, the soldiers' home, etc. Return will be made Sunday evening, with arrival in Washington Monday morning. For all congress members the expense of this delightful trip of the steamer will be \$3.50, the usual price being \$5.00. Except for meals, the only other expense will be for stateroom, for which the charge is \$1.00 each way for a room, which may be occupied by two persons.

ASSOCIATION NOTES.

SUSTAINING MEMBERS.

The following, having paid the fee of ten dollars, have become Sustaining Members of the Esperanto Association of North America since the last report:

Mr. W. F. F. Selleck, North akima, Y Wash.
Mrs. Flora M. Wyman, North Abington, Mass.

Miss Kate M. Holmes, Seattle, Wash.

CONTRIBUTIONS.

The following contributions have been received:

Mr. J. D. Hailman, Pittsburgh, Pa.	\$ 6.00
Mrs. L. deL. Helliwell, Toronto, Can.	2.00
Mr. Nat J. Brooks, Mattoon, Ill.50
Miss Delia Condron, Washington, D. C.	2.00
Mr. Herbert Harris, Portland, Me.	25.00
Mr. Kazimira Vidikovski, Phila., Pa.50

ELECTIONS.

To fill the vacancy in the Councilorship of the Capital Division, the General Council has elected for the balance of the term, Rev. James L. Smiley, of Annapolis, Md.

To fill the vacancy caused by the resignation of Mr. James McKirdy, who by stress of his regular work was unable to continue, the General Council has elected Mr. Frank W. Vedder, of Washington, D. C., as chairman of the Propaganda Committee and member of the Executive Committee.

LITERATURO

NIAGARA!

NIAGARA! Ĉiam la dioj laboras. Se vi kredas, ke ili dormas nokte, kaj sidas sabate apud siaj kamenoj farante nenion, bonvolu iri al Niagara! La pradioj faris en Nord-ameriko grandegajn lagojn, kiujn la nuntempaj volas elverŝi en la oceanon. Elfosinte la fluejon de la rivero Sankta Laŭrenco, ili trovis ke la kvar lagegoj Superior, Michigan, Huron kaj Erie kuŝas kelkcentojn da futoj pli supre ol lago Ontario. Tuje ili sin turnis al la tasko mallevi tiujn kvar lagojn. Nu, akvo estas preskaŭ la sola ilo de la dioj, kaj ili ĝin uzas laŭ praa metodo.

En Seattle, mi trovis ke la homaj fosas per akvo, sed pli rapide ol la dioj. En tiu urbo oni direktas kontraŭ nedezireblaj montoj malgrandajn akvopafilojn kies bateto pezas du mil kilogramojn. Sed ĉe Niagara la paciencaj dioj dum jarcentoj simple verŝas akvon sur krutegajon altan je kvindek metroj kaj larĝa preskaŭ mejlo. Malrapidege ili fosas, eble po tri centimetroj dum tuta jaroj.

Kaj la homoj pensas, ke ili ludas! El ĉiuj partoj de Ameriko oni venas por rigardi kaj admiri la ludadon, stulte opinianta, ke la dioj faras la tutan aferon por ilin amuzadi.

Tien ĉi venas geamantoj, ĵus edziĝintaj. Ili premas manojn reciproke; por li, ŝiaj tremantaj lipoj estas pli mirindaj ol la suno sur la ŝaŭmon brilanta, kaj por ŝi lia dolcigita, karesema voĉo estas pli aŭdinda, ol mil kantoj de la akvoj.

Tien ĉi venas maljunaj geedzoj, kiuj laborinte la tutan vivon, nun volas vidi iun strangajon. Starante tie ĉi super la muĝanta torento, ili pensas pri la fruaj tagoj de geedzeco—pri la infanoj kies naskado, nutrado kaj edukado faris ilin preskaŭ sklavaj dum tiom da jaroj. Nun ili pensadas, kun sufokantaj gorgoj, pri Marieto, infane mortinta; pri Alberto,

foririnta pro malpaco kun sia patro, kaj neniam skribinta; pri Nanjo, feliĉa edzino kaj fidela filino, en kies hejmo ili havas ĝojplenajn horojn, ludante kun genepoj; pri Klanjo, kiun ili ne ŝatas viziti pro la ĝenanta supereco de ŝiaj manieroj kaj la nekutima formaleco ĉe ŝia tablo; pri Vilĉjo, kies nekompetenta edzino rigardis ilin per senesprimaj okuloj kaj diras al ili konvenon per vortoj en kiuj iom da sincereco ĉiam mankas. Ili pensadas senvorte, kaj subite li premas al ŝi la manon—la unuan fojon dum dek jaroj. “Ni devas iri al la hotelo,” ŝi diras. “Nuboj kolektas, kaj kun mia tuso estas danĝere malsekiĝi.”

Venas al Niagara la malesperinto. Estas pli facile sin detruiri en tiu ĉi loko, kie la tuta naturo ŝajne diras: “Kiel malgranda, kiel senvalora vi estas, hometo!” Kiel senkompata estas la homa socio! Ĝi blindigas la okulojn, ĝi dispremas la koron, ĝi malpermesas esperon, kaj eĉ malpermesas morton. Ĉu vi pensas, ke tiom da policanoj estas necesaj por konservi pacon? Tute ne! ili gardas nin, ke ni ne nin mortigu tragedie kaj publike ĉe Niagara. “Mortigu vin,” ili diras, “se vi volas, sed faru private kaj ne ĝenu nian urbon portante vian malesperon tien ĉi. Bonvolu malesperi aliloke!”

Ĉu vi volas vidi Niagaron? Venu kun mi.

Rigardu tiun ponton, kies malaltaj arĉoj fortege konstruitaj sin etendas trans rapidanta rivero. Ni marŝu sur ĝin. Nun, ŝirmu la okulojn per la manoj ĝis vi ne povas vidi la bordojn de la riverego, sed nur la akvon. Ha! la alta horizonto estas nun tute akvo.

“La maro!” vi ekkrias.

Sed vi aŭskultas, kaj anstataŭ la ritme leviĝantaj kaj falantaj ondoj de la maro vi aŭdas seninterrompan muĝadon, kaj la ondegoj ĉiam ŝajne movantaj ne pli proksimiĝas.

Kaj vi memoras, ke la maraj ondoj

rapidas al la bordo kvazaŭ per la ĉiama celo ion atingi. Sed tie ĉi, ne. La akvoj rezistas, ili baraktas, ili batalas kontraŭ la manoj de la dioj, kiuj ĉiam puŝas ilin al la rando de la krutegaĵo—la falego!

Turnu vin, kaj rigardu! Jen la rapidantaj akvoj saltegas kaj malaperas. Tondrega muĝado diras ke ili bategas sin kontraŭ rokoj multe malsupre. Estas kvazaŭ ili iras kontraŭvole al sia morto—la morto kiun la ŝtato volas malpermesi al ni per ĝiaj policianoj!

Jes! la akvo mortas—ĉar vidu! ĝia spirito, vualata per diafana misto, leviĝas ĉielen.

“Niagara!” vi diras.

Nu, ni iru trans la ponton al tiu insulo, sur kiu kreskas bela bosko, ne multe difektita per “arta” kulturo de la homoj. Ni estas ĉirkaŭata per bruego. Muĝado. Tondrego.

Ni atingas la alian bordon de la insulo, kaj jen! alia riverego, dufoje pli granda ol la unua! Same rapidante laŭ deklivo, saltegame per saŭmantaj ondegoj, ĝi verŝas sin super la krutegaĵon en nia plena vido. Larĝa ĝi estas, ok cent metrojn. Ĝi saltas malsupren kvin dek metrojn. Bategante sin en ŝaŭmon kaj miston, sur kiuj junaj spiritoj de lumo ludadas per mil nuancoj, ĝi prezentas vidaĵon je kiu vortoj senpoviĝas.

Mire! Mire! Mire!

Se vi volas, ni nun reiros al la bordo, kaj marŝos sur tiun grandegan ponton, kies skeleto el ŝtato sin streĉas trans la tutan riveron, de Usono ĝis Kanado, . . .

Nun ni plene vidas, el malsupre, la falojn. La orienta falo oni nomas la Amerika, aŭ Usona falo. La insulo, nome Kapro, apartenas al la ŝtato Nov-Jorko. La okcidenta falo, multe pli granda, oni nomas, pro ĝia formo, *Horse-shoe* (huffero) aŭ Kanada falo. Vi ne komprenas la grandecon sen ciferoj aŭ komparoj. La larĝeco de la du faloj estas pli ol mil du cent metroj. La alteco ne ŝajnas granda, sed rigardu tiun kvar-etaĝan muelejon ĉe la bordo de la malsupra rivero—ĝia alteco ne estas unu triono de la falo.

Kio?

Ho, vi parolas pri tiuj fluoj de akvo

kiuj sin elverŝas ŝajne el truoj en la bordoj de la rivero. Ĉu vi ne legis, ke nun oni ŝtelas de la dioj ilian riveron? Per grandaj turnantaj maŝinoj oni faras elektropovon kiu tiras vagonojn, lumigas domojn, faras grandegajn taskojn. Ĉu la dioj scias pri la ŝtelado? Ili nenion diras.

Tamen, ne ekzistas silento pri la afero. Multaj artamantoj diras ke estas hontinda vandaleco, kaj volas ke leĝoj tute malpermesu la uzadon de la akvegoj. Ili estas tiuj, kiuj pensas ke la dioj ludadas por nin amuzi.

Sed estas alia vidpunkto. Se Niagara ne ekzistus, ĉu ni pumpus tiom da akvo por amuzi nin? Kaj se la utiligo de la falo povus liberigi milojn da homoj de la tasko fosi karbon en mallumo kaj danĝero, ĉu tio ne valorus la vidaĵon por geamantoj kaj turistoj?

DU FRATOJ.

El pola lingvo tradukis *B. F. Schubert*,
Washington, D. C.

Migradis du fratoj, brako ĉe brako, laŭlonge la vojo. Estas l'angelo de l'dormo kaj l'angelo de l'morto. Alproksimiĝante al la domejoj de l'homoj, ili haltis unumomente por elekti la kutiman sidejon dumnoktan. Iom post iom malleviĝas la krepusko, densiĝas kaj sterniĝas la grandiga nokto, pli kaj pli disvastiĝas la nebula mistera vualo de l'nokto ĉirkaŭe. Kuŝigante la rigardojn sur la monteton senhoman, ili silente, senvorte, sidigas sin. Susuretas molete la foliaro arbara, aŭdiĝas nenio ĉirkaŭ krom tio. Nur de tempo al tempo eĥo de l'sonorilo preĝeja glitpende trafluas la aeron ĉi-supre. Kuŝiĝas la fratoj, senvortaj, silentaj. Estas la antaŭfesto Kristnaska. En la apuda preĝejo ĉeestas la meson. Bonodorfuma nubo, kiu disvastiĝas laŭ bluaj ondoj plenigas la preĝejan amplekson, la sonoriletoj vibre sonas, kiam la orgenisto metas siajn velkajn manojn sur la klavojn. La cent voĉoj de ĝiaj metalaj tuboj sonadas laŭ akordo majesta kiu, iom post iom, malfortiĝas kvazaŭ la lastaj eĥoj estus forportataj de aera ondeto.

Tiun ĉi unuan akordon, kiu ŝajnas voĉo de l'tero supreniranta la ĉielon, respondas malproksime alia delikata, kiu plifortigas iom post iom ĝis eĉ fariĝi torento de tondriga harmonio. Ĝi kvazaŭas la voĉon de l'anĝeloj, kiuj trapasante la spacon venas en la mondon. Poste oni ekaŭdas kvazaŭ malproksimegajn himnojn kantatajn de la serafaj hierarĥioj, milon da himnoj samtempe, kiuj ŝajnas unu sola malsimpla, tamen ĝi estas nur la akompanado de mirinda melodio, kiu kvazaŭfosas super tiu Oceano de misteraj eĥoj, similas al peco de nebuleto fluganta super la marondoj. Mallaŭtiĝas la kantoj unu post alia simpligante la akordon. Restas sole du voĉoj kies eĥoj kunfandiĝintaj formis unu solan noton vibrantan kiel luma sunradio. En tiu momento, la noto, kiun la orgenisto longigas trile, triiĝas kaj same faras ĉiun en ĉi tiuj notoj, kies eksplodo de harmonio belega ekstremigas la preĝejon, zumigante la aeron de ĉiuj anguloj kaj ŝancelante la kolorajn vitrojn de la mallarĝaj fenestroj. Poste, ĉiu noto, el tia belega akordo, naskis temon, kaj iaj notoj proksimaj, malproksimaj aliaj, kelkaj basaj kaj tenoraj kvazaŭis ke la fontoj kaj la birdoj, la ventetoj kaj la ventegoj, la anĝeloj kaj la homoj, ĉiuj kantas per sia adekvata lingvo, himnojn al Savinta Naskiĝo. La orgeno daŭrigas sian harmonion, la notoj malfortigas iom post iom, simile al mallaŭtiĝo de la voĉo tra la montoj. La fideluloj eliras la preĝejon kaj, disfluante tra la vojoj, revenas hejmen. Pli kaj pli la lumoj estingiĝas. Ĉirkaŭe siltentiĝas.

De la mola sidejo ekleviĝas la frato, la anĝelo de l'dormo kaj, benade disdonas la donacon de l'ĉielo, la dormon dolĉegan por la lacaj homoj. Flugiloj de l'venteto tion forportas glitfluge en la domejojn de l'homoj, lacigitaj de l'penado de ĉiutaga laboro. Endormas la homaro surtere, surmare; ĉirkaŭitaj de revigoj dolĉegaj, sin sentante libera de doloro kaj bezono; la blankhara avino sin sentas tutsana, ne plu bezonas la lambastonon por iri ĉirkaŭen; la infano lulila nun sonĝas feliĉon tre dolĉan, kvazaŭ anĝelan; la malsana fratino ne plu sentas

dolorojn de l'korpo; pleniĝas la koro de malriĉa infano, ĝi ne plu jetas larmojn pro malsato kaj bezono; eniĝas la paco longedaŭra en la koro tuthomara. Fermiĝas tutlace la okuloj de l'homoj kaj la paco rebriliĝas en dolĉa rideto. Plenuminte la devon, la sendito de l'ĉielo, la faranto de l'bono, la alportanto de l'paco, sin kuŝas ĉe la frato malĝoja, ĉe la anĝelo de l'morto. Laŭkutime li restas maldorma tutnokte. Disvastiĝas la silento, pli malheliĝas la nokto; komenciĝas la nokto solena, sterniĝas la paco tutmonda.

Tiele pasis la nokto malluma, mistera. Kiam la unuaj radioj de l'tagastro lumigas la horizonton ŝajnproksiman, levas la okulojn la anĝelo de l'dormo fortiga, profunda kaj parolas per voĉo tre ama, tre dolĉa: Ĉu ne donados al mi la benon la tuta homaro? Ĉu ili ne nomas min la amiko ĉiela? La bonfaranto de l'paco surtera, surmara? Ho! Kiom da ĝojo ja estas nur fari la bonon! Kiom dolĉa ja estas la bonsento dolĉega; la benadoj de la mondo, la bendeziro tutmonda! Kiom, do, pleniĝas la koro, la korsento bonfari! Ni ja estas senditoj de la Granda Spirito, de l'spirito ĉiela! Kiom feliĉa estas la koro, kiom leviganta la devo, kiom enrava la korsento fortigi kunhomon!

Tiele parolis la anĝelo de l'dormo, al la anĝelo de l'morto. Tion aŭdinte, kuŝiĝas surteren la rigardojn la frato, la anĝelo de l'morto. Estas tute mallume, nur malgrandaj flametoj kiel vaglumoj misteraj, de tempo al tempo, suprenflugas al la firmamento, al ĉielo stelumita. Multpeze la koro, plenzorge l'animo! Larmo izola, la perlo de l'koro, forsteliĝas de interne. Larmo post larmo surfluas la okulojn, iom post iom malheliĝas la rigardo de l'anĝelo de l'morto. Li ekploretas molete. Kial, do, estas nur mia sorto malĝojigi la homon? Kial estas mia devo nur eligi la larmojn? Se ajn estus mia devo plenĝojigi la koron, feliĉigi la homaron, kaj sekigi la larmojn, malpezigi la zorgojn! Se ajn estus mia rolo ĉeestadi ĝojigan rondeton de l'homoj! Kie ajn mi eniras, komenciĝas malĝojo, doloriga malespero! La amiko tutmonda mi tre ŝatus ja esti, sed alpor-

tanto de l'zorgo, malĝoio kaj larmo mi ja devas nur agi! Multpeza la koro, elŝteligas la larmoj!

Tiele parolis la anĝelo de l'morto kaj li premis la manon de l'anĝelo de l'morto.

Kion, do, vi diras, fratulo karega? ekparolis la frato, la anĝelo de l'dormo. Ĉu vin eble la homo, la justa, ne iame rekonos? Je la reviviĝo estonta, tiam estos la tempo; tiam vin ja rekonos la tuta homaro, tiam vin oni nomos la amiko tutmonda, la faranto de l'bono! Ĉe la granda renaskiĝo, ĉe le reunuiĝo estonta vin benados la rondeto homara, la infanoj, la gepatroj, la gefratoj, la parencoj! Aŭskultu al mi, mia frato karega! Ĉu ni ambaŭ ne estas la senditoj de l'ĉielo? Ĉu ni ne estas la filoj de sama Dipatro? Ĉu ni ne ambaŭ penados ekfari nur bonon? Jesiginte ĉi tion, silente ili premis reciproke la manon bonvolan, la okuloj de ambaŭ pleniĝas je ĝojo, je ĝojego ĉiela. Aŭdiĝas nenio, sed oni ekvidas la belan rebrilon, la rebrilon ĉielan en la vizaĝoj de la fratoj.

LA AMANTOJ DE GERTO.

Laŭ William Norris tradukis E. J. Burnham

ANTAŬ longe estis lando, ne signifas kie aŭ kiam, bela lando, kaj bona en kiu loĝi, riĉa en riĉaĵo de ora greno, belega pro multaj arbaroj, banigita de grandaj riveroj kaj agrablaj, fluantantaj riveretoj; plue, la unu ekstremo ĝia estas limigita de la lavado de purpuraj ondoj, kaj la alia de la gardemo solena de purpuraj montoj.

Unu someran tagon frue, en bela malaltlanda valo de tiu ĉi bona lando, laborante per sia kudrilo, fraŭlino sidis, dum ŝi pensas pri aliaj aferoj, kiel kutimas virinoj. Filino ŝi estas de simpla kamparano, kulturisto de la komplezema tero, fiŝkaptanto en la arĝentaj akvoj de la rivero, kiu preterfluis la dometon mal-supren al la urbo malproksima; li vivadis de tago al tago, ne vidante multajn homojn—la unu aŭ du najbarojn kiuj loĝas en la dometojn proksimajn; la pastron de la malgranda domareto; kelkfoje ian metiiston, kiu vojiras serĉante laboron—escepte kiam li iras al la militoj, ĉar li estas militanto, kiel estas laŭbezone ĉiuj el la viroj de tiu lando. Antaŭ kvin

jaroj lia edzino estis mortinta, kaj lia filino kun li sole loĝis; ankoraŭ ŝi, kvankam de tia malalta deveno, estis tre belega, nek nure tiel, sed ankaŭ grandioza kaj simila al reĝino, tia virino kiel povus inspiri tutan popolon por fari ian agon de saĝa malmiteco pro ŝia amo.

Kiaj pensoj estis la ŝiaj, dum ŝi sidis laboranta, je tiu somera tago matene, la kantoj de birdoj tute ĉirkaŭ ŝi, kaj la brueto de la malaltaj verdaj riveraj ondoj sonanta freŝe kaj agrable, dum la okcidenta vento blovis ilin al ŝi? Kiaj pensoj? Bonaj pensoj, certe. Ĉar la lando en kiu ŝi loĝas—tia bela lando, tia malgranda lando—neniam estis ĉesinta esti deziregita de la tiranaj reĝoj kiuj ĉirkaŭe regadis. Ĉiam ili kontraŭ ĝi militadis; neniam ili estis venkintaj, kvankam kelkfoje ili ŝajne estis sukcesaj en ia batalo tie ĉi kaj tie, per fortikeco de nombroj nure, ĉar la loĝantoj de tiu bona lando estis de malsimila raso al la mal-laboremaj, sklavemaj homoj kiuj loĝis ĉirkaŭe. Multajn kantojn Gerto povis kanti al vi pri kiel, ja antaŭ longe, ili venis el lando tre malproksima, trans la maro, kie la neĝoŝargitaj pinaj arbaroj, teruraj salonegoj de strangaj formoj, pendas super la glaciigitaj akvoj tra trimejloj kaj trimejloj laŭ la marbordo kiuj estis la luliloj de potencaj nacioj. Marveturante trans la maro tien, antaŭ longe, iliaj ŝipoj tute flamantaj per ŝtalo, kiun la herooj portis, ili alvenis al tiu ĉi lando, kun siaj edzinoj kaj infanoj, kaj tie ĉi ili faris furiozan militon kontraŭ la sovaĝaj bestoj, kontraŭ la sovaĝaj marĉoj, drakloĝataj, kuraĝante la malsaton kaj la morton en ĉiuj teruraj formoj.

Kaj ili pligrandiĝis kaj pligrandiĝis, ĉar ilin favoris Dio; kaj tiuj, kiuj loĝis plej proksime al la "Sovaĝa Lando," kiel iam ĝi kutime estis nomata, fariĝis pli kaj pli similaj al la fremduloj, kaj ilia bona regado ampleksiĝis; kaj ili havis grandegan kredon ke ili iafoje ĉirkaŭprenos la terglobon, irante ĉiam okcidenten ĝis ili atingos sian malnovan hejmon, en la oriento, nun tiel malproksime malantaŭe forlasitan.

Pensu do ĉu la tiranaj reĝoj timis tiujn liberajn, kuraĝajn homojn! Pensu, ĉu

fariĝante pli kaj pli kruelaj, dum ili fariĝis pli kaj pli timemaj, ili streĉegis la ĉenon sur la mizeraj milionoj de siaj regatoj, tiel ke, por multe da ili, ĝi fariĝis netolerebla, kaj estis elrompita; tiel ke, en bonfarado kaj malbonfarado, ampleksiĝis la regno de Dio.

Pensu, kiaj armeoj supreniris kontraŭ la bonan landon; kiom da ebenaĵoj kaj valoj estis semitaj de glavoj kaj lancoj kaj kaskoj, kaj la ostoj de bravaj viroj. Estinte sennomita, konata nur kiel la loko kie tia kaj alia arbo kreskis tre plenece, kie tia rivero fluis, nun tia loko fariĝas memorinda por ĉiuj tempoj, kaj ne estos forgesita en la eterno.

Pensu pri la furiozaj bataloj, sur insidaj, glitigaj akvotransirejoj, kie la rondaj ŝtonoj ruladis kaj movadis sub la rapidigata piedbatado de viroj batalantaj por vivo, kaj por pli ol vivo, meze de la plaŭdo de la ruĝigitaj akvoj, en la malvarma, ekventa duonlumo de la Februaraĵoj matenoj; aŭ en densaj arbaroj, iomete lumigataj de la malalta suno, ĵus malleviĝonta kie la nuboj ŝajnis tondroplenaĵoj en la someraj vesperoj; aŭ kun kriegoj de ŝtona kruteĝaĵo al ŝtona kruteĝaĵo de la grandaj ardezkrutaĵoj, kun kolerega tondrado de ŝtonoj malsupren en la interpremigitan intermonton sube, kun vanaj sagflugoĵoj. Ĉar la sagoj ne povis enpiki la monton aŭ salti inter la fendoj de la ŝtonegoj, kie staras la montanoj, sovaĝe ĝojegaj.

Pensu ankaŭ pri la multaj, kiuj, kvankam ili tute ne batalis per lanco aŭ glavo, ankoraŭ ja portis la perfortecon de multaj bataloj, pacience atendente dum la korŝirantaj maldormadoj, tamen nensed ne perdante fidon.

tante la nedireblan mizeron de disiĝo, ankoraŭ ne perdante fidon.

Ĉu Gerto do ne havis sufiĉon pri kiu pensadi dum ŝi laborante sidis apud la loko kie la akvo lekumas la blankan sablon? Ĉar tiuj ĉi homoj estis tiel kuntiritaj, ke, pro la amo kiun ili portis unu al alia, elkreskis teruregaj heroaĵoj, ĉiu el kiuj estus sufiĉa por vivtempa pripensado; preskaŭ ĉiu viro el tiu nacio estis heroo, kaj taŭga kunulo de la anĝeloj; kaj la gloro de iliaj patroj, kiel fari agojn

kiuj ne hontigus ilin, estis la aferoj pri kiu ĉiam pensadis la viroj; kaj siaflanke, la virinoj deziris ke ili fariĝu la edzinoj de bravaj viroj, la patrinoj de bravaj filoj.

Tial do Gerto kantis maldelikatajn, vivegajn kantojn pri la heroaĵoj de la antikva tempo, pensadante pri ili ankaŭ, kun tuta sia koro, dum ŝi kantadis. Ĝi do, malforta virino kiel ŝi estis, ĉu ŝi ne vidis la ŝipojn de la malamikoj supren-trenitaj sur la insulo malantaŭe tie, kaj tie bruligitaj? Ĉu tie ankoraŭ ne estas ŝimantaj la duonbrulintaj, superkreskitaj de briono ŝtipoj, kiuj, iam ruĝe kaj nigre kolorigitaj, kutime portis teruregon al la pacemaj, mallaboremaj homoj de la insulo? Ĉu ŝiaj okuloj ne ekbrilis, ŝia brovo kaj vango ne ekruĝiĝis triumfe, ŝia koro ne ŝvelis kaj sin levis sub ŝia brusto, tiam, kiam la batalmuziko ĉiuminute pli apude alproksimiĝis kaj fariĝis pli laŭta; kaj tiam, kiam ŝi fine ekvidis la malgrandan bandon de karaj samlandanoj ĉirkaŭanta la malkuraĝigitajn militkaptistojn, dum la blanka, ruĝkruca standardo flirtis super ĉiuj, egale benante ĉiujn; kaj tiam, kiam sian propran karan patron ŝi vidis, brava inter la plej bravaj, marŝanta tie, kun helaj okuloj kaj lipoj rondotorditaj de ĝoja, triumfa indigno, kvankam la sango de kiu li ja estis signita ne venis sole el la vejnoj de liaj malamikoj? Ĉu ŝi do ne kantis ĝojege kaj plenvoĉe, rememorante tiujn ĉi aferojn kaj multe da aliaj, dum la okcidenta vento ankaŭ estis ĝoja ĉirkaŭ ŝi, dolĉe murmurante al ŝi pri aferoj rilate al la lando de promeso?

Ŝi kantis pri reĝo kiu vivis antaŭ longe, viro pli saĝa kaj brava ol ĉiuj aliaj. perfide mortigita de sekretaj senditoj de la malamiko, en ĉasbando, kaj mortigita je la supro de lia saĝo kaj bonregado; kaj tiu ĉi estas unu el la kantoj per kiuj lia popolo estis enbalzamiginta lian memoron. Tial, dum ŝi kantadis, jen la blovado de trumpetoj kaj la piedbatado de ĉevaloj, ĝuste kiam ŝia voĉo klare sonoris:

La reĝo elrajdis frue matene,
 Casrajdante trans la herbejo;
 Antaŭ la tiama roso refalis,
 Ho ve! okazis kia ĉagreno.

